

Eugen Macko

Evoluo de la naciaj ideologioj ĉe la mezeŭropaj popoloj

1. Nociklerigoj

Antaŭ ol mi eksplikas la enhavon de la temo, nur malonga provo klarigi la vortojn de la titolo. Difini mi ne volas kaj ne povas, kaj ankaŭ mi pridubas ĉiun ekzaktan difinon tiurilate. En la socio-politika sfero, ĝuste pro la kredo al iu „scienca“ difino, multobliĝis multe da duonscioj, en kiuj oni facile enfalas, sed multe pli malfacile eliras, ankaŭ se en la rilato al la tuto montriĝas ĝia relativeco.

Nun: kio estas evoluo? En tiu kunteksto la evoluon mi volas kompreni, kiel la relative ĉiaman pliboniĝon de iu antaŭa stato en la historio al iu novo. Tio devus signifi, ke neniu pozicio estas absoluta en la tempo, sed ĉiu ŝanĝiĝas, al la pliboniĝo, alie la konscia historio havus nenion sencon kaj ni povus lasi por la naturo ĉion fari, aŭ al dio (kiel kiu pli ŝatus tiun esprimon). Tio signifas, ke mi opinias ke ĝenerale nia nuna socia stato en la estanteco estas pli bona, ol ĉiuj antaŭaj en la historio, sed por tion kompreni, kial, ni devas provi konscie kompreni ankaŭ tion kio okazis en la pasinteco kaj lerni de tio.

La dua vorto: Kia estas io nacia? La difinoj de tio kia estas nacia, dependas de diversaj cirkonstancoj. De historiaj tempoj, de sociaj sistemoj, de ŝtataj interesoj, ktp. Oni alie difinis en socialismaj landoj, ol en feŭdismaj aŭ kapitalismaj. Oni ekzemple alie difinas ankoraŭ nun eĉ en Francio, ol en Germanio, aŭ en Hungario. Ĝenerale estas direble, ke tio kio estas nacia, ne estas difinebla, pro tio restas ĉia nacia elemento nur ideologia. Tiun rilaton volas tiu prelego iomete klarigi per la ekzemplo de la mezeŭropaj popoloj.

Kaj kio estas ideologio? Ideologioj estas dense ligitaj kun la idealismo, specife kun la grek-devena eŭropa idealismo. Oni povas eble diri ke ideologio estas fiksta idealismo en iu tempo. Tio kio montriĝis antaŭe kiel nur ideo, sen plena rilato al la realeco, estis deklarita kiel vero; fakte elŝirita el la evoluo kaj limigita al ideologio. Estas interese observi, ke en la diversaj partoj de la tero disvolviĝis diversforte la ideologioj. Tie kie restis la popoloj pli proksime al la naturo, la ideologioj ne disvolviĝis tiel rapide, kiel en pli rapide civilizitaj pejzaĝoj. Sed, estas ankaŭ observeble, ke la ekestiĝintaj ideologioj en iu tempo poste bremsis la socian evoluon de iu regiono. Al tiuj regionoj apartenas ankaŭ mezeŭropo.

Kie estas mezeŭropo? Se ni rigardas la mapon de Eŭropo, simple geometrie estas konstateble ke mezeŭropo troviĝas en tiu parto, kie en la historio disvastiĝis antaŭe la iama Habsburga-Monarĥio, kiu nomiĝis post la 1848-a revolucio la Austro-Hungara-Monarĥio. Kaj ĝuste la proksimo de tiu historia tempo sur tiu teritorio estas ekzemplodone interesa por observi la evoluon de la naciaj ideologioj ankaŭ ĝenerale, kiuj en la postaj tempoj ĝis en nia estanteco havas gravan (bedaŭrinde ankaŭ ofte tre malfavoran) efikon al la socio-politika vivo eĉ en la tuta mondo.

Kaj la lasta nocio de la titolo: Kiuj estas la popoloj? Ĝenerale oni povas diri ke popoloj estas aro de homoj, kiuj kuniĝis por pli facile travivi en la natura ĉirkaŭaĵo, atingi komunajn celojn, kaj en la tempo ekestis komunaj kutimoj, moroj, sintenoj, ktp. kiuj karakterizas ilin. En tiu meza parto de Eŭropo vivis, jam ĉiam dum al ni konataj historiaj tempoj, tre diversaj popoloj, kiuj venis tien, restis tie, aŭ el diversaj kialoj

denove foriris aŭ malaperis. Tiuj popoloj kiuj nun en tiu tempo, el kiu mi volas preni mian historian ekzemplon, disvolviĝis fortan diversajn naciajn ideologiojn, kiuj siatempe necesis por la kultura memstareco kaj evoluo, sed alvenis ankaŭ la tempoj, kiam tiuj naciaj ideologioj bremsis la pluevoluon en tiu regiono kaj bremsas ĝis nun, pro kio estus necese nekaŝite plilumigi kaj esplori la historiajn kondiĉojn por ilia ekesto kaj daŭro.

2. Enkonduko

Popoloj jam ĉiam havis kulturon, ĉar ĉiu komunumo povas kunvivi nur se ili havas iun komunan regulon, kiu jam apartenas al kulturo. Sed en Eŭropo, tra la historio ekestis la stranga komprenado, pri kiu oni komprenis „la kulturon“ eksklusive nur, el la historio de la klasik-greka, tra la Romia Imperio evoluanta kulturo. (Oni diferencigis inter la popolkulturo kaj la klasika kulturo. Ni havas museojn por la popolarto kaj por la klasika arto)

Aperiĝis historia tempo en Eŭropo, kiam ĉiuj tie vivantaj popoloj, alprenis la preman devon, la sian ĝis tiaman kulturon, per klasike evoluantaj normoj esprimi, formigi kaj ordigi. La lingvoj ricevis almetinte la skeleton de la latina gramatiko, por „kultivigi“, novan idealan staturon. La ĝis tiam ĝenerale nur de generacioj al generacioj rakontitaj spertoj, per la nov formita „klasika“ lingvo, komencis esti ankaŭ skribitaj. Ekestis iu kulturo en la miksaĵo de la praa popolo de iu grupo, kun la klasik-eŭropa grek-latina kulturo.

En tiu nova kulturepoko ekestis ankaŭ novaj problemoj. Antaŭe la latina lingvo ligis, tie kie necesis komuna interkompreniĝo, la diversajn popolojn kun iliaj diversaj kulturoj. Sed nun ekestis la idealo de la memstara suvereneco el iu mistike profunda prahistorio, el kiu nun ĉiu de la multaj popoloj volis sin mem aserti, per la propra lingvo kaj kulturo, ne plu atentinte ĉu la aliaj popoloj komprenas ilin aŭ ne.

Tiu tendenco baldaŭ disvolviĝis en la unu-kontraŭ-ali-eco. Per la idealo de la en si mem enŝlosita propra suverena nacia ŝtato, ankaŭ kontraŭ al ĉiuj aliaj, t.e. al la resto de la mondo. En tiu memaserto ĉiu volis esti tre „sciencia“ (en la tempo aktuala) kaj provis konstrui la propran asert-sistemon por „fundigi la rajton de la propra ideala ekzisto“ (kion oni antaŭe en la natura rilato unu al alia tute ne bezonis) kiu deformiĝis en la volo de superiĝo al ĉiuj aliaj, el la fakte nur supraĵe konataj legendoj de la propra historio. Se la scienco reale ne povis fundigi la dezirojn, restis bonvena ankaŭ duonscienca ideologio.

Eble ni povas diri, ke ĝuste en tiu parto de la mondo, en mezeŭropo kausis tiuj ideologioj la plej multan malfeliĉon, malamon kaj suferon, unu kontraŭ la alia; kiujn sekvis militoj, perfortoj kaj forpeloj. En la estanteo vere alvenis la tempo, paroli pri tiuj, ofte en psikaj kompleksoj forŝovitaj tabuaj problemoj, inter la diversaj popoloj, ilin klare prilumigi kaj lerni el la historiaj spertoj.

Unu el la sciencistoj kiu (jam en la 80-aj jaroj, de la lasta jarcento) prilumigis historie en inter-nacia konteksto la ekeston kaj disvolviĝon de naciaj ideologioj en tiu regiono, estis prof. Arat³ Endre, membro de la „Hungara Akademio de la Sciencoj“.

Por apogi mian prezentadon en tiu prelego, mi uzas liajn sciencajn

esplorojn, kiuj baziĝas sur faktoj de skribitaj tekstoj, en tiamaĵ ĵurnaloj, kunsidoj, konferencoj, deklarioj kaj literaturaj verkoj de la spiritaj gvidantoj, de la komenco ĝis la estiĝo de la naciaj ideologioj en tiu parto de Eŭropo; ĉe Ĉeĥoj, Slovakoj, Ukrainoj, Rumanoj, Germanoj, Serboj, Kroatoj, Slovenoj kaj Hungaroj.

En la metodo de Arat³ estas trovebla, la nuntempe tre aktuale estiĝinta, „inter-eco“ de la esploro, ĉe la temoj kun socio-politikaj enhavoj. Li atentigas al la necesa sintezo de la ĝisnunaj serioze sciencaj historiaj esploroj el la diversaj landoj, kiam ne plu sufiĉas enmergiĝi nur en la propra profundeco. Por la ekŝajno de la, en la eŭropa tuteco (kion ni politike jam apartenas) ne plu akcepteblajn unuflankajn asertojn, estas necesa subigi la disigendajn miskomprenojn el la divers interpretitaj historioj.

3. Historie sur la vojo al la burĝa evoluo, estas ankaŭ la komenco de la naciaj ideologioj.

En la multpopola mezeŭropo, la naciaj movadoj komenciĝis en la krizo de la, al fino alproksimiĝinta feudalismo kaj en la frua komenco de la kapitalismo. Je la fino de la 18. jc. tiuj naciismaj tendencoj estis tute modernaj, ili kvalite kunfalis en la lingve-kultura kaj politike-socia klopodo de la burĝa disvolviĝo. Unuflanke efikis la sloganoj de la Franca Revolucio, „libereco-egaleco-frateco“, aliflanke tute en la dialektika senco de ĉiu revolucio, (kiel la revolucioj manĝas la proprajn infanojn) ĝuste tiuj valoroj estis limigitaj al nur nacia sfero, poste eĉ turniĝinte unu kontraŭ la alia nacio, fakte atingite la malon de la komenca volo.

La naciaj movadoj apartenis tiutempe al la granda historie universala evoluo de la demokratio. Intelektuloj turniĝis, sub la influo el Francio, al la propra popolo, kontraŭ la feudalaj ordoj kaj la reĝa stato. La novorientiĝo bezonis ankaŭ novajn spiritajn enhavojn. Junaj homoj lernis eksterlande la pli evoluintajn liberajn ideojn kiujn reveninte en la hejmlando ili uzis por konstrui programon de la liberiĝo, kuniginte la ekspluatantan popolon, (sed precipe nur la propraetnan) per la vekigo de nacia konscio.

La intensoj estis diversgradaj ĉe diversaj popoloj. Tiuj, ekz. de la kroatoj, kiuj havis jam antaŭe multe da nobelajn privilegiojn en la monarkio, la komenco de la nacia movado ne estis tiel intensa kaj radikala kiel ekz. ĉe la Serboj aŭ Rumanoj kaj Slovakoj kiuj ĝuis nur malmulte de la privilegioj. La politika taktiko, „partigo kaj rego“ (divide et impera, ankoraŭ de la Romia Imperio) iomgrade kaj iatempe funkciis ankaŭ en la mezepoke feudala Austra Imperio, ĝis la venko de la respubliko en Francio.

En la linio de tiuj demokratiaj ŝanĝoj, en la najbara lando Francio, la hungara revolucio devigis Austrion al ekvilibriĝo kun la plej forta popolo en la imperio, sed la monarkia sistemo restis ankoraŭ la sama. Aliflanke ĝuste tio ekviigo, de nur unu popolo, ĉagrenigis la aliajn, kiuj ankaŭ mem suferis sub la subpremo, de siaj, nun ĉiam pli klare ekkonataj homaj rajtoj kaj instigis ilin al batalo por la propra suvereneco kontraŭ Austrio kaj nun ankaŭ Hungario.

La relative vasta autonomio de la kroatoj en Hungario, kiujn ili ĝuis en la antaŭa historio, ankoraŭ ekde la kunbatalo kontraŭ la Turkoj, ebligis al ili relative la plej grandan liberecon, en kultura kaj politika emancipiĝo. Sed sekve de la evoluo de novaj naciaj ideoj, ili

ne plu akceptis la uzon de la hungara lingvo en oficeoj kaj la administrado. Unue venis la kontraŭstaro de nobluloj kiuj deklaris la volon, uzi la latinan, apogante kun la argumento, ke en la multnacia Hungario nur 1/3 de la loĝantaro parolas la hungaran lingvon.

Ke, ankoraŭ la kroataj nobeloj postulis la uzon nur de la latina, sed ne la kroatan, montris la feudalan karakteron de ilia volo kaj la restadon malantaŭ de la ĝenerale tiam moderna socia evoluo en Eŭropo (kion oni povas tiutempe diri por la tuta ankoraŭa Habsburga Monarkio). Post la perdiĝo de la potenco de la nobeloj kaj la plifortiĝo de la burĝa klaso, estiĝis ankaŭ ĉe la kroatoj pli forta la postulo disvolvigi kaj uzi propran nacian lingvon.

En aliaj regionoj kie mankis la potenco de la nobeloj, la burĝa postulo de naciaj elementoj fortiĝis pli rapide. Tamen ke la serboj ĉ. 500 j. de Turka okupiĝo ne havis propran reĝteritorion, precipe per la pravoslava ortodoksa religio estis iliaj kulturaj radikoj protektataj, eĉ eksteren de la olda patrolando. Ortodoksaj intelektuloj organizis en Temesvar 1790, (tiam Hungario, nun Timisoaro en Rumanio) fakte ekster Serbio, la unuan nacian kongreson (sabor), kie komencis la nova serba nacia movado. Permesata estis la kunveno de la Austra kortumo, kiu esperis (ankoraŭ tiam) ekvilibrigi la hungaran potencon en la austra imperio, kontraŭvole al hungaraj nobluloj.

Ankaŭ ĉe rumanoj, ankoraŭ antaŭ la apero de la burĝa nacia ideologio, estis la plej forta ligilo, la komuna orient-grek-ortodoksa religio. La nobelajn titolojn ricevis la rumanoj nur rare, pro tio por la disvolviĝo de nacia ideologio ne estis tiusence konsiderindaj baroj. La potenco de la eklezio super la kamparana popolo, kiujn ili samtempe, ne retene ekspluatis kaj regis, estis sufiĉe forta.

En la jaro 1791 (ankaŭ sub la instiga influo de la serba kongreso en Temesvár) la rumanaĵ ĉefpastroj prezentis al imperiestro en Vieno deklaran egalrajtecon, (de kiu ili poste estis senhavigitaj) kun la transilvaniaj saksoj kaj hungaroj kaj esti agnoskita kiel nacio en la Habsburga Imperio. La respondo el la kortego estis preteriranta kaj venis la klerigo, iu sence tiel, ke; ili devas pace kunvivi kaj ami la aliajn ĉirkauajn popolojn, sed ne gravas havi propran nacian agnoskon.

La slovakoj vivis en la tiama norda parto de Hungario. Ilia situacio estis la plej malfacila, de ĉiuj de jam antaŭe menciitaj. Tiu popolo tute ne havis en la malantaŭecon la apogon de la nobluloj kiel la aliaj, pro tio sia ideologio estis plu senpere ligita al la novaj naciaj movadoj. Antaŭe estis parte, kiel jam ĉe aliaj, la religio ligilo por popola identeco.

Pro tio la slovakaj nacia ideologio evoluiĝis precipe grade el la ĝenerala slava aparteneco. Ili klerigis: Jam la nomo de slovakoj signifas slavonon, kaj pritraktis sin kiel la parto de la granda slava nacio kiu etendiĝis inter la Balta, la Nigra, kaj la Adriatika maro, ĝis en Sibirio. Tiel la slovakaj lingvo devus esti la plej proksima al la praslava lingvo. Ŝatata ideologia argumento estis la laŭdira parkaika ekzisto de la slava nacio per la, de la Aleksandro de la Granda, donitaj privilegioj al la slavoj.

Grava motivo de la slovakaj ideologio de la 18.jc. estis la sin-defendiĝo. Tiu ekestis kontraŭ la sub-jugiga teorio de la hungaroj, kiuj tiel interpretis sian patruj-okupon. La slovakoj asertis: Kiam la hungaraj hordoj alvenis al la Panona ebena, la slavoj estis jam longe antaŭe tie, okupiĝante kiel kamparanoj, ili estis fakte la praŭloj. Tiel devus havi la slovakoj grandan konstruktivan aldonon al la, plu cent jara hungara historio.

Aliaj ideologiaj elementoj por la eksterordinareco de la slovaka nacio estas ke: Panonio estis la prapatrujo de la slavo, kie centre troviĝas la slovakoj kaj ilia lingvo staras plej proksime al la praslava, la plej olda kaj la plej pura lingvo, pro tio la slavo estas la plej glora kaj plej olda nacio, ilia nomo mem devenas de la vorto; gloria.

Tiuj elementoj konstruis kune, la slovakon nacia identec-koncion de la 18-a jc. kaj tiel ili volis fakte kompensi la mankantajn privilegiojn en la feudala Habsburga monarkio, ankaŭ kontraŭ la aliaj slavaj popoloj, kiel la kroatoj kaj la serboj.

La ĉeĥa nacia vekiĝo havas similajn elementojn kiel la slovaka. Ĉe la tradicia Praga Universitato estis faritaj esploroj por pruvi la ideon pri la praa unueco de la granda slava nacio kaj ilia posta disfalo al diversaj gentoj kaj lingvoj. Per la dividiĝo en gentoj ekestis la dialektoj kiuj estiĝis la diversaj slavaj lingvoj. La opinioj de la slavistikaj lingvistoj ne estis unuecaj. F.M. Pelcl diferencigas kvin lingvojn (rusa, pola, serba, kroata, ĉeĥa). Dobrovsky parolas nur pri kvar (ĉeĥa, pola, rusa, ilira).

Jam el tiuj diferencoj estas ekkonebla ke la opinioj de la lingvosciencistoj grandparte ne kongruis. Estas rimarkebla ke la slovaka kunfalas kun la ĉeĥa kaj memstare tute ne estas menciita. Ekzistis eĉ opinioj por la alia ekstrema flanko de la ideologioj, kiuj pridubis la taŭgecon de la ĉeĥa lingvo por alta literatura verkado kaj proponis uzi la germanan.

La plej malforta popolo sur la teritorio de la Austra monarkio estis la ukraina, alie nomite: la rusina, aŭ ruthena. Ili havis nenion mezepokan privilegion kaj ili longe eĉ ne havis iun konscian intelektularon, kiel ekz. la slovakoj. Ilia religia eklezio, longe ankaŭ ne povis ekevoluiĝi, ĉar la rusinaj pastroj estis tra jarcentoj submetitaj al la grek-ortodoks-katolika episkoparo en Eger (en norda Hungario). Pro tio komenciĝis ilia nacia emancipiĝo unue je la linio de la volo al religia memstareco, kun la postulo de la propra episkoparo.

La unua rusina historiisto Bazilovic (nomita la ukrainan Herodot) emfazis ĝuste tion, ke la rusinoj vivis jam de la unuaj jarcentoj de la kristanismo sur la Panona ebena kaj la ukrainoj estis jam 867 de Cirillo kaj Metodo baptitaj, post kiam restis en Hungario ĝis la 13. J.c. la greka ceremonio valida. Nun, la rusinoj ĉeestis jam longe antaŭ de la hungara alveno sur tiu teritorio, ili estas autohtonaj kaj pro tio ili havas la plej valoran rajton esti tie.

La ĝenerala opinio pri la slavo kaj pri la nacia emancipiĝo de la popoloj, rimarkeble ŝanĝiĝis post la, 1792 aperinta libro de J.G. Herder pri la "Filozofio de la historio de la homaro". (Ideen zur Philosophie der Geschichte der Menschheit) Tie li atentigas pri la "eksterordinara tasko" de la slavo, pri iliaj "ekskluzivaj karakteroj", pri iliaj "heroecaj sintenoj", por la homaro, ĉar ili kultivigis eĉ la klimato, por la homoj, plej malfavorajn pejzaĝojn de la tero. Herder ĝenerale emfazis la necesan pluevoluiĝon de la lingvoj de la popoloj, por ilia pluekzisto.

4. Lingvan kaj kulturan aktivecon sekvas politika postulo de la nacia emancipiĝo

Komence de la 19-a jarcento malfortiĝis la feudalaj naciaj privilegioj,

Kun similajn problemojn luktis ankaŭ la slovakoj. Ili devis ankaŭ krei literaturan lingvon por la pluevoluigo de sia kulturo. La evoluo iris en du direktoj, ankaŭ se la kontraŭaĵoj ne estis tiel akraj kiel ĉe la serboj, la diverseco en opinioj kausis ankaŭ tie prestiĝbatalon. La komenco de la slovakaj literaturaj reiras al la 16. Jc. , sed ne per la propra, sed per la ĉeĥa lingvo. Ĉar la slovakoj ne estis pravoslavoj, ili ne uzis eklezian lingvon, (kiel la serboj) sed la protestantaj slovakoj uzis la ĉeĥan. Tiu uzo parte estis favora por la kultura evoluo, se parte ankaŭ bremsis la memstariĝon.

Grava paŝo al la memstariĝo estis la ekŝajno de la vortaron de Bernolak (1827). Lia celo estis purigi la slovakajn lingvon de la malutilaj fremdaj influoj. Fakte tiun celon li ne povis atingi, sed lia laboro estis granda paŝo en la evoluo de la slovakaj lingva kulturo. Sur la alia flanko troviĝis J.Kollar, kiu volis la komunan pluevoluon de la ĉeĥa lingvo. La kontraŭaĵoj multkaze malfortiĝis kaj en plujaj problemoj ili trovis komunan solvon, tiel ke la slovakoj kaj la ĉeĥoj ĝis ankoraŭ nun bone povas kompreni unu la alian.

En la aperinta slovakaj literaturaj verkoj, komence en la heroaj eposoj, la eksteraj malamikoj de la tiamaj slavaj naciaj movadoj, la germanoj kaj la hungaroj, ludas gravan kontraŭecan rolon. En idealisme verkita eposo, la barbaraj hungaroj kiuj enfalas en la hejmlandon de la slovakoj, estas venkitaj de la, al la granda slava nacio apartenintaj fieraj slovakoj. Poste abundas literaturaj verkoj kaj teatraĵoj kun similaj naciisme koloritaj enhavoj. Ekz. en la poemo de Jarmok, estas priskribita la ideala kamparana socio, kie: Ĝi ekzistas reĝoj nur unu la alian amataj homoj, kiujn direktiĝas la religia kredo. La devo por realigi tiun socion havas la slavaj popoloj. Ilia historia tasko estas enkonduki la feliĉajn tempojn.

Sekvis fondiĝoj de slovakaj organizaĵoj kiuj ideologie apogis la kulturen evoluon. 1803 estis fondita en la Pozsonya (Bratislava) evangelista liceumo, la ĉeĥoslovaka katedro kaj la alligita slavaj instituto. Apude agis studentaj organizaĵoj, per kiu estiĝis Bratislava la slovakaj kulturcentro. Nun ekkomencis ideologiaj bataloj ĉe la lernejoj inter la slovakaj kaj hungaraj studentoj, kiuj ofte alprenis akrajn esprimformojn. Tiun evoluon ne ŝatis toleri la hungara reĝa klaso kaj 1838 malpermesis la slovakajn organizaĵojn apud la lernejoj.

La rumanoj estis ankaŭ okupitaj kun la pluevoluo de ilia literaturo lingvo kaj ankaŭ estas du diversaj direktoj rimarkeblaj. Unuflanke la latinida kaj la alia kiu volas involvi la riĉecon de la popollingvon en la evoluon. Okazis kelkaj provoj novkonstrui la lingvon sur tiu intenco. 1808 G. C. Roja eldonis du lingvistikajn laborojn en kiuj li proponas anstataŭ la cirila (de la eklezio) la latinan skribmanieron enkonduki, kio poste ankaŭ sukcese okazis.

La poeto J. Budai-Deleanu formis la rumanan el la vulgara-latina lingvo, kun la influo de la vortoj el la aliaj lingvoj kun kiuj la rumanoj havis kontaktojn, tiel la slavaj, rusaj kaj serbaj vortoj, sed ne enlasas la prunton el la turka, greka, hungara kaj germana. En la vortaro estas troveblaj eĉ francaj kaj latinaj vortoj kiuj antaŭe ne estis en la rumana.

Konekte aperis literaturaj verkoj kiuj pluevoluigis la lingvon. La temoj estis kiel jam ĉe la aliajn lingvoevoluojn, priskribo de heroecaj bataloj de rumanoj kun malamikoj en la historio kaj alvokoj al

kontraŭstaro la tiamajn subprenantojn de la popolo. M. Eminescura la popolpoeto skribis alegorie komikan eposon, kie li uzis la eblecon esprimi ankaŭ siajn progresivajn opiniojn kaj kritikis la klerikularon kiel apoganto de subjugigon de la popolo flanke de la feudalaj regantoj. Li montris al la materiala kialo de la militoj, esprimis sian simpatian kun liberalismo kaj gloris la respublikon.

Ne mankis skribaĵoj ankaŭ kun naciismaj enhavoj. Aperas ankaŭ ĉe la rumanoj la, jam de aliaj popoloj konata subjugiga teorio de la hungaroj. La prauloj de la hungaroj konkeris la praŭlojn de la rumanoj. Sed la aŭtoro sekve lasas pripensi sian aktoron; ĉu tio okazis antaŭ pli ol 900 jaroj, kial devas oni suferi por tio ankoraŭ nun?

Aperas ankaŭ himnecaj alvokoj. Ekz.: Vekiĝu rumana popolo de via morta sonĝo! Nun, aŭ neniam, montru ni al la mondo, ke en tiuj brakoj fluas ankoraŭ romia sango, ke niaj brustoj engardas glorie la nomon de la triumfa Trajanuso. La poeto malbenas la denunciatojn, la malkuraĝulojn kaj la timemantojn. La nacia ideologio, la romiana deveno kaj la konscio pri la latinideco de la lingvo, volas redoni la fierecon, ke la rumana popolo, se ĝi al konscio vekigis, estos kapabla registriĝi kaj ne bezonos suferi sub aliaj popoloj kiuj ekspluatas ĝin.

La saksoj en transilvanio estis en pli favora situacio kiel la aliaj popoloj tie. Ilia lingva evoluo povas rerigardi al granda tradicio, ĉar ili alŝlosiĝis al ĝeneralaj germanaj normoj. Fakte ili flegis nur unun germanan dialekton en transilvanio. Sed 1848 jam la evangelika episkopo ordigis uzi la germanan literaturan lingvon. En la transilvane saksa poezio rimarkeble esprimiĝis ilia aparteneco al germanoj kaj la pli malvasta amo de la tiea patrujo. Apud spegulon de la hungaro-saksaj kontraŭaĵoj parte ricevis mención en la literaturo ankaŭ la restaĵoj de iu hungaro-patriotismo.

En la saksa patriotismo troveblas ĉiam ankaŭ la konscia aparteneco al la germana. Ekz.: Se vin, germana gardisto, / ankaŭ stormoj minacas, / ne ŝanceliĝu kaj laŭ vera / germano lojala estu ĝis la morto! / Gardisto de la parenca germana popolo, / Restu germano, Mia saksa kamparo!

Aŭ alia poezio: Sur fidela kaj libera saksa tero kiel sakso mi naskiĝis / kaj tiu mi volas resti libere kaj fidele ĝis mi elspiras mian animon. / sakso, sakso, al tio mi ĵuris.

Vigla estis la kunlaboro inter saksoj en asocioj kaj kluboj. Jam ekde la fino de la 18-a jc. ili kunvenis en urbaj legcirkloj, kazinoj, turnsocietoj kaj muzikasocietoj. 1839 komencis en Hermanstadt (Nagysebben, Sibiu) la muzikinstruado kaj estis koncertoj organizitaj. Tie estiĝis ankaŭ la scienca kaj kultura centro de la transilvaniaj saksoj. 1817 malfermiĝis la atentema Bruckenthal Muzeo (kiu nuntempe 2007 okaze de la EU kultururbeco estis renovigita). Poste tiutempe okazis ofte en tiu urbo kunvenoj de sciencistoj kaj diversaj konferencoj.

La nacia movado de la ukrainoj estis relative al ĉiuj tiuj aliaj popoloj neevoluinta. Per la influo de la unita klerikaro restis la popolo sufiĉe longe sukcese en la feudalisma ordo kaj ne estis interesa la nacia konsciiĝo. En la lernejoj ili plue lernis en la latina, hungara kaj germana lingvo. Forta estis la hungara estiĝo ĉe la rusinaj intelektuloj, ĝis la malfermo de prospera ebleco el la alia flanko. En Rusio tiutempe fondiĝis unu altlernejo kaj universitato post la alia,

kaj la rusinaj slavaj inelektuloj lernintaj en Austro-Hungario estis ŝatataj kaj bezonataj kiel profesoroj ĉe la rusaj lernejoj. Poste ĉe tiuj intelektuloj, ekestiĝis ne la ukraina, sed en la slava komuneco la rusa nacia konscio.

La lingva luktado ĉe la rusinoj okazas inter la decidoj, ĉu evoluigi propran ukrainan lingvon aŭ alpreni la jam per la literaturo altevoluitan rusan lingvon. M. Lucskay, episkopa sekretario, plendis por la sud-karpata-rusina lingvo kiu plej malsamas de ĉiu alia slava dialekto sed estas tamen la plejsimila al la praslava ĉi lingvo de la biblio. Li proponis fari de tiu lingvo literaturan lingvon, eĉ iun grandan, por ĉiuj slavoj uzeblan ĉi lingvarum. Li emfazis ke; ĉi lingvo de la popolo ne estas la sama kiel la lingvo de la kultivitaj individuoj, ĉar la pensoj akaŭ ne similas. Pro tio, sur tiu spirita bazo konstruita lingvo, povus plejbone kontentigi kulture ankaŭ la plej altajn bezonojn.

Estas interesa mencii en tiu rilato la similecon kun la konservativa serba klerikalaro. La diferenco estas nur ke Lucskay konstatis tion ĉe la, de la rusinoj uzata lingvo, kaj la serboj de ilia slaveno-serba lingvo.

Alia problemo montriĝis en la spirito de tiu tempo; la asimilado, unuflanke kun la hungaroj kaj aliflanke kun la rusoj. Inter tiuj ambaŭ devis ekevolui la rusin-ukraina nacia konscio. La unuaj rusinaj skribaĵoj aperas en la legolibro de Duchnovics kiu 1847 aperis en Budapeŝto, en la rusina popola lingvo, pro tio la lernantoj sufiĉe bone komprenis ĝin. Li skribis ankaŭ la unuan rusinan himnon, en kiu estas jam la vekiĝo de la rusina naciismo ekkonebla: Mia subkarpata rusina popolo/ Sufiĉas la revo,/ Super vi vokas la sonorilego/ Libere, en paco/ Vivu mia rusina popolo.

Kaj el aliaj versoj estas aŭdebla la kontraŭstaro al la asimilado: Rusino mi estis, estas, estos,/ Mi naskiĝis rusina./ Mian honestan specon mi ne forgesas,/ Mi restas la naskiĝanto de mia nacio.

5. Naciismaj kontraŭaĵoj

La klasika lingva kaj kultura evoluo de la popoloj en la Habsburga Monarĥio, kausis vekiĝon de la naciaj konscioj. La krizo de la feudalismo kaj la burĝa disvolviĝo eruptiĝis revoluciojn, kiuj tremis ankaŭ la Austrian diverspopolecon. La revolucio de la plej forta popolo en la monarĥio, (la hungara) dissolvis la ĝis tiam, per la nobelaj privilegioj neutraligitajn kontraŭaĵojn, per la antaŭpuŝo de la propra naciismo, kiu ekkausis kontraŭstaron ankaŭ de la aliaj popoloj.

La kontraŭaĵoj manifestiĝis unue kontraŭ la hungaroj, kiuj jam en la mezepoko kelkcentjaroj regis sur tiu teritorio de la Panona ebena la diversajn popolojn; kaj nun en Austrio la hungaroj estis sole ekvilibrigitaj. Eĉ la ekvilibriĝo fakte ne estis vera ekvilibriĝo, ĉar Austrio en si mem tiam ne estis nacio, sed la sintezo de diversaj mezeŭropaj popoloj kiuj parolis komune la germanan lingvon, sed tamen ne identaj kun la germana nacio.

La hungara naciismo altbalanciĝis rapide per multflankaj kontraŭaĵoj al aliaj popoloj, ĝis unuflanka memasetanta ideologio. Ekestis abunda hungaropatriota literaturo, ankaŭ kun akraj intelektaj insultoj per ridindigo de la kulturoj de la aliaj. Ĝis la kontraŭaĵoj inter la popoloj tielsekve disvolviĝis al politike tragikaj dimensioj.

La hungarigaj tendencoj komenciĝis jam fine de la 18-a jarcento kaj pliakriĝis meze de la 19-a jc, kiel reago al la volo de nacia identiĝo de aliaj popoloj. Fine de la 18a jc. aperis en hungaraj ĵurnaloj ĉiam pli ofte, skribaĵoj pri la graveco de la disvastigo de la hungara kulturo kaj estis diskutita ĉiel la anoj de diversaj aliaj popoloj povus estiĝi hungaroj.

Sciencaj studoj volis fundigi ĉiel estas la hungara lingvo pluvalora por kultura evoluigo ol la lingvoj de aliaj popoloj. Ne mankis ankaŭ tiaj sciencaj konsultoj kiuj volis pruvi, ke nur la hungaroj kapablas nacian kaj ŝtatan unuecon. Kelkaj laboroj volis historie plifundigi la devenon de la hungaroj, el gloriaj tempoj kaj samtempe malpligrandigis la devenon de aliaj popoloj, ofte farante ridinda iliaj streboj al nacia identeco.

Unu de la tipa entuziasto estis la advokato Chazar Andras, kiu skribis, ke li ĉiel amas sian hungaran lingvon, ke ŝatus se la anĝeloj ankaŭ parolus ĝin. Samtempe li volis ankaŭ purigi la hungaran lingvon de ĉiuj fremdaj influoj. Pri li, la infanoj ankaŭ de aliaj nacioj, jam de komence devus lerni la hungaran lingvon.

Tiusence, la landa kunveno en 1825 deklaris ke, en la unua klaso de la lernejoj estus nur tiuj infanoj allasitaj kiuj jam scipovas la hungaran lingvon. Sekve la gepatroj estus devigitaj lernigi la hungaran al la infanoj, jam en la infanĝardenoj, ekde la frua infaneco.

Regis la eldiro; se iu manĝas la hungaran panon kaj ricevas hungran salajron, devas scii la hungaran lingvon.

La redaktoro de la Scienca kolekto (de hungaropatriotaj skribaĵoj) Andras Thaisz opiniis ke, la slavaj lingvoj estas la restaĵoj de iu iama granda praa kulturo, sed hodiaŭ ili ne plu kapablas plenigi la litreturajn postulojn. Li diris malkaŝe ke, oni devas sincere ĉion fari, ke ekz. la slovaka lingvo tute malaperu.

La radikoj de tiuj opinioj troviĝas jam en la feudalismaj tempoj. Tiu parte pluvivis ankaŭ en la burĝa evoluo, provante doni iun profundiĝon per ideologia rekonstruado. La hungara feudala nobla klaso nomis la lingvojn de diversaj popoloj la lingvoj de la servistoj. Ilin la nobeloj eĉ ne pritraktis kiel personoj, sed nur kiel aĵoj. Pri iliaj nocioj, personoj (persona) estis nur la nobeluloj, sed ekz. la rumanoj kaj slovakoj estis nur (res) t.e., iu aĵo.

Gyorgy Fejer, universitata profesoro en Peŝto, plendis eĉ en siaj sciencaj esploroj: Ni hungaroj, estinta reĝa popolo, kie ni postrestis. Estas tempo ke ni vekiĝu kaj distingu nian reĝan lingvon, de la servista rumana, armena, bosnia, kaj multe de aliaj tielaj popoloj.

En la sciencaj kolektoj de 1824 estas legebla: La slovaka estas servutlabora lingvo; la hungara venkinte okupiĝis la landon, sed la slovaka portas la nomon de la servuloj, ĝi ne povas ricevi en la hungara patrujo nacian nomiĝon. La skribinto de la artikolo, havas la saman opinion ankaŭ pri ĉiu alia lingvo en la multpopola hungario.

La nobela naciismo havis la radikojn en la memkomprenebleco de la tiama feudala sistemo. Pri tiu imago, plenrajtaj civitanoj estis nur la nobeloj kaj pro tio por fondi nacion estis nur ili kapablaj. Regis la opinio, ke por la servutoj ne gravis al kiu nacio ili apartenas kaj al kiu mastro ili servas.

Kvankam poste la burĝaj revolucioj, ŝanĝis la feudalan

memkompreneblecon de la sociaj sistemoj, plene ili tamen ne povis liberiĝi de antaŭaj kutimoj. Estas observebla, ke la antaŭaj kontraŭaĵoj inter la nobeloj kaj servistoj, per la vekigo de la naciaj konscioj ŝanĝiĝis, pliakriĝante en la kontraŭaĵojn inter la popoloj. La reĝaj strukturoj forŝoviĝis de la nobela al la burĝa klaso, kiam estis la popoloj pli vaste envolvitaj en la evoluo, per kiu jes ekestis pligranda socia, ekonomia kaj produktiva potenco, sed samtempe ankaŭ pliakriĝis la disiga forto inter ilin.

Eĉ en popolkantoj de tiu tempo estas troveblaj malestimoj de aliaj popoloj kaj glorigoj la propran. Kiel ekz.en la sekvan:

Hungaron amu hungara virino,/ Se la amfajro maltrankviligas vin,/ Ĉar la hungaro ne trompas,/ Por sia honesto vivas kaj mortas./ Sed la slovakoj ĉiuj flirtemaj/, Por germanoj kredi estas damaĝa,/ Sed la hungaro por sia famo,/ Vivas mortas por sia honoro.

6. Moderiga burĝa naciismo

Post la sekvo de la malestima nobela naciismo aperis ankaŭ kelkaj pli progresivaj kaj moderigaj burĝaj opinioj.

Ekz.; Kazinczy Ferenc diris ke; ĉi nur la hungara lingvo faras la hungaran nacion (kiu kongruas ankaŭ kun J.G. Herder). Li emfazis ke la hungara lingvo devus esti disvastigita, sed ĉiu ankaŭ el aliaj popoloj povus estiĝi hungaro, se ili parolas la lingvon.

Besenyey Gyoergy skribis: ĉi devus fari la inter ni loĝantaj germanoj, slovakoj kaj aliaj civitanoj al hungaroj, ili povus tion post bona ekzemplo fari, ĉar eĉ la monarko alprenis la hungaran vestaĵon kaj parolas la hungaran lingvon, sekve estiĝis hungaro.

Ankoraŭ en la transira tempo, ĝis la pliakriĝo de la naciaj kontraŭaĵoj, pasiĝis kelkaj paciencaj kaj modestaj opinioj. Troviĝas verkistoj kiuj alvokas al amikaj kaj toleremaj kunvivado inter la popoloj.

Sandor Istvan, la redaktoro de ekde 1791 periode aperinta Scion disvastigintaj volumoj esprimas sian juĝon pri la pozitivaj trajtoj de diversaj popoloj kiuj kunbatalis heroje kun hungaroj kontraŭ la komunaj malamikoj, (precipe kontraŭ la turkoj) kiel la kroatoj kaj la serboj.

La saksojn li nomas laborema, sparema, negockapabla popolo, kiuj multe faris por la scienco en transilvanio.

La slovakoj estas, diligenta popolo kiuj prilaboris sub malfavoraj klimataj cirkonstancoj ankaŭ ne fruktodonajn terpartojn. Kaj atentigis ke, multaj gravaj hungaraj sciencistoj havas slovakon devenon (kaj nomas ekz.: Bel Matyas, Kollar Adam, Timon Samuel). Ankaŭ en la metioj estas la slovakoj elstaraj kaj ne malpli estas herojcaj iliaj soldatoj.

Li eĉ preferis la scion ankaŭ la lingvojn de tiuj popoloj, se iu volas komuniki sur la teritorio kie ili loĝas.

Peczeli Jozsef skribas en tiu periodaĵo, pri la estimo de najbaraj popoloj kaj instigas al la ekkono de ilia historio, moroj, kutimoj, propaĵoj, ktp.. Precipe tiuj bezonas tion, kiuj laboras en oficoj. Ili povas sin kapabliĝi al postenoj se ili parolas la lingvojn de la ĉirkaŭaĵo en kiu ili laboras kaj komprenas la popolojn. Li diris: Tiel la homo estiĝos nur tiam vere por la propra patrujo, se ĝi

parolas nur alian lingvon, la serban, kroatan, rumanan, slovakon, ukrainan, germanan. Ili estas nur aliparolantaj hungaroj. Ĝi Memkompreneble tiu koncepto kausis fortan kontraŭaĵon al la popoloj kiuj mem volis disvolviĝi la propran nacian identecon kaj respondis per forta kontraŭ naciismo.

La aliaj nacioj kontraŭbatalis per similaj ideologiaj argumentoj per kiuj la hungaroj antaŭe volis fortigi sian regadon, returnigante la antaŭajn kalumniojn. Ili nomis la praulojn de la hungaroj ĉe nekultivintan barbaran azian hordon kiuj enfalis en la Panona Ebena mortiginte la tie jam vivantaj, per agrikulturo okupiĝintajn popolojn. Tiel ekflamiĝis akre la jam en la antaŭaj jardekoj blovigita naciisma fajro kaj ekkauzis:

8. Naciismaĵ kunfrapoj de politikaj grupoj

Kontraŭ la hungarigaj tendencoj plej akre defendiĝis la kroata burĝa nacia movado. Parte ili forlasis la antaŭan strategion de la nobeloj kiuj per la latina lingvo volis bremsila la enkondukon de la hungara kaj nun ili esprimis ankaŭ la postulon uzi la ilir-kroatan lingvon en la, de la kroata plimulto loĝantaj distriktoj.

Baldaŭ ricevis la kroata nacia movado apogon eĉ el Vieno. Sedlinitzky la Viena policia ĉefo konstatis ke; Ĉe la kroata nacia movado meritas apogon por bremsi kaj ekvilibrigi la strebon de la hungara naciismo. Metternich skribis poste en siaj memoaroj ke, ĉe kontraŭ la hungara nacia movado estis plej efike la apogo de la, kun Viena kortumo aliancajn kroatojn.

Tiel iun tempon ankoraŭ efikis la ĉe divide et impera ĉe olda politika maksimumo de la Habsburga Monarĥio, sed la naciajn revoluciojn ĝi tamen ne povis malebligi. En la tute nova mondpolitika situacio de tiu tempo, tiu agadmaniero helpis nur pliakrigi la kontraŭaĵojn kaj eki la perfortajn revoluciojn. (Metternich mem devis post la 1848a revolucio fuĝi al Anglio)

En la 1840-aj jaroj la kroata reĝa klaso dividiĝis en du partioj; en la ilira, la posta ĉe kroata nacia partio kaj en la ĉe hungara partio. Sur la pinto de la illira partio baldaŭ staris la austroamikaj nobeloj; kiel, pro la socia evoluo en la tiama tempo, ankoraŭ disiĝis la komuna forto de la nacia movado, kio ne malhelpis, sed kontraŭe, akcelis la radikaliĝon de la politika klimato.

1842 ĉe la oficira novigo en Zagrebo, aperis multnombraj armitaj studentoj kaj komencis interbatadon. Sekve la policio ne plu enlasis la membrojn de la ĉe hungara partio kaj tiel la novigo de oficiroj finiĝis per la venko de la illir-kroata partio. Tiu incidento faris grandan indignon, pri kiu skribis ekscitite la hungaraj ĵurnaloj. En la venonta landa kunveno, la hungar-partianoj akre kontraŭprotestis.

En la 1843-44 ĉe landa kunveno, jam estis regita de la hungara-kroata kontraŭaĵoj, iter la jam elformiĝinta partioj de la ĉe hungaro-kroata partio kaj la ĉe illir-kroata partio. La delegitoj de la illira partio volis anŝtataŭ hungare, latine paroli, pro tio ili estis subbruigitaj de la aliaj deputitoj kaj sekvis kaoson en la parlamento.

Venonte ĉe kelkaj kunvenoj en la distrikto de Zagreb okazis eĉ sangaj bataladoj ofte kun kelkaj mortintoj. 1845 ĉe la novigo de oficiroj

okazis perforta incidento, kiam la hungara partio estis en majoritato kaj sukcesis nomigi la distriktestron. La illira partio ne akceptis la balotrezultojn kaj denove mobilis la studentojn, provokis bataladon kun 17 mortintoj kaj 60 vundigitoj.

Tiuj incidentoj okazis nur kelkaj jaroj antaŭ la hungara revolucio kiam la reĝoj en Vieno provas per ĉiu metodo regi la imperion, ankaŭ per subteno de partioj kontraŭ la demokrate balotitaj rezultoj.

Metternich havis la starpunkton ke; ĉiuj la illirismo kaj la hungara liberalismo kontraŭstaras la interesojn de la imperio. Sed li decidis tamen subteni la illirismon, ne nur pro tio ĉar la hungara liberalismo estis pli forta, sed ankaŭ pro tio, ĉar la illira estis ankoraŭ pli konservativa kaj tiel pli konvena por la Habsburga Monarĥio.

La naciismo evoluiĝis en la kontraraŭaĵojn inter la tiama ĝenerala socia evoluo de la demokratio kaj la homaj rajtoj (radikiĝita per la la jam okazinta Franca Revolucio) kaj la konservativaj fortoj, kiuj volis halti la oldan privilegian feudalan sistemon kaj la propran reĝon.

Por la konservativaj fortoj estiĝis ĉiu metodo bonvena por resti sur la potenco. La Metternich-a reĝimo aktivigis la sekretajn servojn, enŝovinte kiel nur povis, maltrankvilecon inter la diversaj naciaj movadoj de la popoloj. Alvenis al la tagordo interbataladoj ĉe kunvenoj kun diversaj popolanoj.

En tiu atmosfero de interbatalado de la anoj de diversaj popoloj evoluiĝis kaj radikaliĝis la naciaj ideologioj unu kontraŭ la alia, ĝis la tragikaj dimensioj de la unua kaj sekve de la dua mondmilito, kiuj, (ni eble eĉ sen troigo povus diri) ĝermis kaj pliakriĝis ĝuste en tiu hemisfero de la mondo, en mezeŭropo.

9. Konkludo

En la malantaŭeco de tiu atmosfero ekestis strangaj teorioj de ideologioj pri iuj glorioplenaj tempoj de la popoloj en la kontraŭaĵo al la aliaj, kiuj vere neniam ekzistis kaj neniam povis esti per seriozaj historiaj esploroj pruvitaj. Sed ili poste forte ĝenis la ĉiutagan vivadon de proksime, ofte pordo apud pordo vivantaj diversaj popolanoj. Por solvi la problemojn de la diverseco, estis elpensitaj iuj idealaj sociaj konstruaĵoj. La nacio devis esti iu ideale, homogena unueco, sed kiu fakte nenie kaj neniam estis atingita. Ĉiam restis nur iu ideo, poste subtenita ankaŭ per perforte konstruitaj leĝoj, deformiĝinte en la poste ofte eĉ kruela naziismo.

La teoriaj radikoj de tiu evoluo estas serĉablaj jam en nia grek-romia eŭropdevena klasika historio. Unuflanke la sistemkonservativa forto de la reĝa klaso kiuj volis pludaurigi sian privilegion (estu tiu sklaveca, feudaleca aŭ alia) kaj aliflanke la socia evoluo kiu nereteneble postulas la renoviĝon. Kiel tiu ŝanĝo okazas, decidas la manieron de la demokratio. En la tiamaĵ tempoj, de kie prenis tiu prelego la ekzemplon, ankoraŭ per perfortaj revolucioj. Ĝis en nia tempo, la pluevoluo de la necesaj ŝanĝoj, alprenis la paca demokratia konsento per balotoj.

En nia tempo de la tutmondiĝo necesas pridemandi eĉ nian, por ni memkompreneblan klasicisman kulturon, kiu estas precipe eŭropa evoluo, el la antikva greka, tra la rom-imperia kaj poste burĝa evoluo, kiu estas sekvante malvaste ligita kun nia naciismo (ankaŭ se al la unua rigardo ŝajnas tute kontraŭe). La klasicismo solviĝis ĉiam pli en la reala tempo, superigante en la idealismo, el kiu poste dissolviĝis la divesaj

naciaj ideologioj.

Tiu eŭropa evoluo povas esti pli konscia kaj ekkonebla en la komparado kun aliaj, ne-eŭropaj kulturoj, pro tio la historia metodo de Endre Arato estus uzenda ankaŭ en globala dimensio por konsciigi la relativecon ankaŭ ĝenerale de nia eŭropa kulturo.

Prof. Arato vidis jam siatempe la alvenintan tempon starigi (ankaŭ nuntempe tre aktualan) projekton; en la kunlaboro de fakuloj el diversaj orienteŭropaj landoj, esplori komune la historion kaj en sintezo efektiviĝi komunan eŭropan trajton. En la sintezo, kiu tamen ne volas fiksi la novajn ekkonojn, sed kiu restas ĉiam malferma por korigo per alvenintaj scioj. Kiu povus esti nomita pri la ^â^À^Ðdialogika filozofio^â^À^Ü, ^â^À^Ðdialogika metodo de la hitorio^â^À^Ü. Bedaŭrinde li mem tiun projekton ne plu povis realigi, sed ĝi restas ĝuste en nia nuna situacio de la eŭropiĝo tre aktuala tasko por la venonta generacio de historistoj kaj pensistoj kapablaj alpreni la novan kaj aktualan.

Mi volis en tiu prelego montri la relativecon de naciaj ideologioj kaj samtempe al la komuna eŭrop-klasika radiko kiuj etendiĝas ree en la grek-romiaj, herojecaĵoj tempoj. Kiu estas por la eŭropaj popoloj komuna evoluolinio, sed globale pritraktite, ili mem estas nur relativaj. (Sed tion ekspliki estus jam tasko de iu alia laboro.)

Eble la konsciigo la kontraŭaĵojn kaj ilia historia ekesto ene de Eŭropo, helpas al iliaj solvoj. Per la ekspliko de diversaj eŭropaj kulturoj unu apud la alia kaj ilia komparado povas helpi atingi la konscion de la subigo.

Samtempe povas montriĝi la valoro de ĉiu diferenta unueca kulturo, kiuj radikas ankoraŭ en la netrarigardebla antaŭklasikaj tempoj kaj donas ĝis en niaj tagoj vivapogan bazon.

Apud la protektado de la diverseco en la natura ĉirkaŭaĵo, samgravas ankaŭ protekti la kulturan diversecon, kiu necesas por nia spirita tuteco en la mondo.

Mi dankas por Via atento

[Part 2, Image/JPEG 1MB.]
[Unable to print this part.]